

VOLAPŪK

Kiam aperas Esperanto, en la jaro 1887, la lingvo Volapŭk estis jam disvastigata de jardeko en Eŭropo kaj en parto de Ameriko kaj Azio.

Volapŭk estas artefarita lingvo elpensita de filologo Johan Martin Schleyer, kiu naskiĝis en Granddukejo Baden -Nederlando- en la jaro 1831.

La vorto Volapŭk estas kunmetita el -VOL-, kiu signifas mondon (vola estas ĝia genitivo), kaj -PŪK - kiu signifas lingvon. Sekve Volapŭk egalas: - lingvon de la mondo-.

Tiu lingvo aperas pro antaŭlonge neceso de universala konvencia komunikilo. Pluraj fakuloj, antaŭ Schleyer, klopodis, diversmaniere, solvi la problemon sed sensukcese. En la dua periodo de la XVII jarcento, la germana filozofo kaj matematikisto Wilhelm von Leibniz elprovis la prilaboradon de "Artifike ĝenerala lingvo" sed li ne sukcesis fini la verkon.

En tiu jarcento la plej rimarkinda prilaboro estis "Eseo de filozofia lingvo" de angla episkopo Wilkins. Sekve aliaj fakuloj klopodis eltrovi taŭgan sistemon ĝis kiam, en la XIX^a jarcento aperas Volapŭk.

Dum la pasigo de jaroj, en Eŭropaj nacioj plivastigas la sektoro de produktado kaj disvendado; la industrio daŭre progresadas pliigante, supermezure, la rilatojn kun esterlando. Pro tio ne multaj personoj estas en kondiĉo koni la ĉirkaŭ 800 lingvojn parolatajn en la mondo. Eĉ inkludante nur la ĉefajn civilajn popolojn kiuj, pro la evoluanta socia ordo, estas devigataj interrilati, devus havi la konon de almenaŭ kvindeko da lingvoj. La lingvistoj mem povus atingi la celon sed dediĉante sin dum la tuta vivo. La komercistoj, do, estus devigataj aŭ preterlasi la aferojn, aŭ turniĝi al perantoj de aliaj popoloj kaj landoj kun granda malŝparo de tempo kaj de mono. Tiu obstaklo ekzistus ankaŭ por kleruloj kaj scienculoj.

Schleyer, kiu bone konis 55 lingvojn, prenas en konsideron la fakton ke ĉiuj popoloj atribuas egalvaloron al la numeraj ciferoj en aritmetiko kaj al la grafike reprezentado de algebrakvantoj, kvankam il prononcas tiujn malsane per siaj respektivaj lingvoj. La sama afero koncernas la muzikajn notojn: valso de Strass, ekzemple, eldonita en Vieno, estas interpretata, legata kaj ludata egalmaniere en la tuta mondo. Oni povas konsideri ke ankaŭ la semafora signalaro estas universala lingvo laŭ signoj. Ĉiuj nacioj utiligas ĝin sammaniere kaj la maristoj de la tuta mondo komuniĝas inter si, je distanco, per elsendataj signoj.

Schleyer opinias ke ankaŭ internacia lingvo devas bazi sin sur konvencia sistemo simila al tiuj de matematico, muziko kaj signalaro. Pro sia simpleco ĝi devas esti uzebla de ĉiuj civilaj popoloj en internaciaj rilatoj. Ĝi devas sin proponi per prononco taŭga al ĉiuj tiel ke, ekzemple, frazo prononcata de Arabo estu bone komprenata de Franco aŭ Anglo. Krome ĝi devas ĉesigi la superecon de iu lingvo sur la aliaj kaj la ekeston de rivaleco inter la nacioj.

Volapŭk, efektive, ne montras la malregulecojn de la ordinaraj lingvoj ĉar ĝi havas nenan escepton. Ĉiu litero havas nuran senŝanĝan sonon. Oni prononcas la vortojn tiel kiel ili estas skribataj. Oni adoptas rektan konstruon. Oni formas adjektivon, verbon kaj adverbos regule el la substantivo. Ekzistas ununura deklinacio, unu terminaĵo de pluraloj kaj adiektivoj, unu koniugacio por la verboj, ĉiuj regulaj. Oni obtenas ĉi-rezulton per pliigoj kaj finaĵoj simplaj, konstantaj kaj reduktitaj ĝis la minimumo. Tiamaniere oni povas esprimi ĉiun koncepton aŭ nuancon de penso plej precize, sen miskomprenoj. Oni utiligas radikalojn de indo-eŭropaj lingvoj, ĉefe de la romiaj kaj germanaj.

En la jaro 1881 aperas la unua gramatiko entenanta volapŭk-germanan vortaron.

Oni eldonas, poste, malgrandajn kompendiojn de gramatiko en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj, eĉ en latino kaj en hotentota dialekto. Ekstas ĉirkaŭ 200 kluboj en eŭropaj nacioj, en Ameriko kaj eĉ en Sirio. Ĉe ili malfermiĝas kursoj vizitataj de ĉiuaĝaj lernantoj el ĉia socia tavolo. Per ministeria dekreto naskiĝas en Francio, en la jaro 1886, la "Franca Asocio por la propagando de volapŭk" kiu starigas 12 publikajn kursojn en kvartaloj de Parizo kaj inaŭguras aliajn en la tuta Francio. Aperas revuoj en la ĉefaj eŭropaj urboj, eĉ en Porto Riko. En Rusio oni akceptas Volapŭkon kiel telegrafian lingvon. La volapŭkista literaturo riĉiĝas je originalaj kaj tradukitaj verkoj, je traktatoj de korespondado, je kolekto da poemoj, sentencoj, proverboj k.t.p.

En la unua kongreso okazinta apud Konstanca lago, en la jaro 1884, Schleyer invitas la pli ol 300 ĉeestantojn por pridiskuti sian sistemon. La dua kongreso okazas en Munkeno kaj la lasta en Parizo. Kiu ajn volus, povus sendi al Schleyer disertaciojn pri ĉia temo, kondiĉe ke tiuj ne entenu gramatikajn erarojn. Se li sukcesos, li ricevos diplomon pri "Majstro de Volapŭk".

La plej indaj atingos diplomon pri "Supera Majstro".

La prilaboro de Volapŭk kostis al ĝia aŭtoro 20 jaroj de laboremaj klopodoj.

Intertempe naskiĝas alia internacia lingvo, kiu en posta tempo, nomiĝos Esperanto. Malsame al Volapŭk, ĝi parolas al la tuta homaro pri egaleco, frateco, interkompreniĝo, interne de granda familia rondo.

Eble pro tio, iom post iom, ĝi sukcesas vuali kaj formeti al la forgesujo la lingvon de Schleyer.

Skripita de Norma Covelli el Trenta Esperanto Asocio.